

La Informilo de Nagoja Esperanto-Centro

センター通信 第309号 2023年7月17日発行


発行：名古屋エスペラントセンター Nagoja Esperanto-Centro

461-0004 名古屋市東区葵一丁目26-10ユニブル新栄301号

公式サイト <http://nagoja-esperanto.a.la9.jp/>

Facebookページ <https://www.facebook.com/nagoja.esperanto>

郵便振替口座 00840-8-40765 「名古屋エスペラントセンター」



◀◀ 目次 ▶▶

Ho Song さんを迎えて	2
Kelkajn tagojn kun malnovaj geamikoj en Ena (Ho Song)	3
Vidindaj Lokoj en kaj ĉirkaŭ Nagojo (15) (Yamaguti Sin'iti)	4
Sinprezento de nova membro (相原輝)	7
今後の活動	7
活動日誌・編集後記	8

Ho Song さんを迎えて

韓国から日本へ旅行中の Ho Song さん（プサン在住）を招き、6月11日（日）午後5時から6時、名古屋エスペラントセンター事務所において講演会を行った。

講演テーマは“Kiel koreoj kaj japanoj efike lernu kaj studu Esperanton?”とし、初心者も含めて8人が聴講した。（初心者のためにはウイSPリング通訳を山口眞一が行なった。）

Ho Song さんは韓国エスペラント協会語学委員会の委員長で、日本語もできる。長年エスペラントを教えてきた経験から、韓国人と日本人が苦手とする発音（例：韓国人ならs/z、日本人ならl/rの区別など）についてどう教えるか、あるいは語の使い方などを例にあげ、ネットでの学習も含めて、効果的な指導についてのヒントを提供してもらった。最終的に大切なのは話しかける気持ちと人間関係である、とも。

講演終了後は有志数名が事務所に残り、意見交換を続け、夕食を共にした。

Ho Song さんはこの後名古屋で一泊し、翌日に横浜へ向かった。

（山口眞一）



Kelkajn tagojn kun malnovaj geamikoj en Ena

HO Song (Busano)

Mi estas korea artpentristo havanta multajn geamikojn ankaŭ en Japanio. Lastatempe mi vojaĝis en Japanio de Kansajo ĝis Kantoo partoprenante en la Kongresoj de Esperantistoj en Kansajo en 3-4 junio, kaj en Kantoo, en 17-18 junio.

Dum tiuj tagoj mi restis ankaŭ en Nagojo kaj en Ena, Gifu.

Loĝinte ĉe mia malnova amiko s-ro OGAWA Kazuo en la 6-7 junio, kun li mi vojaĝis al Mizunami por renkonti esperantistajn geamikojn en Ena ĉe la domo de s-ino HUGIMOTO Hideko, en la 8a de junio. Survoje al ŝi en la stacio de Mizunami ni renkontis s-inon YAMAMOTO Yukiko kaj s-ron SAIKI Akira, kiu veturigis nin tri al Ena.

Ĉe s-ino HUGIMOTO Hideko, la gasta amikino de multaj vizitantoj ankaŭ de Koreio, kaj posedanto de ĉarma domo kun bela ĝardeno kaj bela teceremoniejo, renkontiĝis ok personoj, krom la gastiganto, mi, s-ro OGAWA, s-ino YAMAMOTO, kaj ges-roj KUROYANAGI kaj ges-roj SAIKI.

Ĉe la unua revido mi trovis, ke la homoj aspektis maljuniĝintaj, ĉar mi ne vidis ilin dum kelkaj jaroj, sed dum la du-tri hora agrabla babilado tiuj vizaĝoj tute refamiliariĝis al miaj okuloj, kaj ne sentis ian malsamon ol antaŭe.

Ĉiuj bone parolis en Esperanto, kaj ne ĉesis ridoj kaj paroloj. Ankaŭ la trinkaĵoj kaj manĝaĵoj estis bonegaj. Mi kaj s-ro OGAWA tranoktis tie, kaj en la 9a junio renkontis du lernantinojn de s-ino HUGIMOTO, nomataj s-inoj BANTOU kaj YOSHIMURA, kaj kun ili partoprenis en la teceremonio. Poste oni kunsidis ĉe manĝotablo

kaj daŭris konversacio. Tiam ni tri esperantistoj propagandis Esperanton al la du aliaj. Ili havis intereson pri la nova kulturaĵo, kaj ankaŭ pri la esperantista familia etoso.

Mi estis feliĉa pro tiu okazaĵo, kaj tre dankas al la malnovaj geamikoj kaj al s-ino HUGIMOTO.

Ĝis, Ena!



Vidindaj Lokoj en kaj ĉirkaŭ Nagojo (15)

La Muzeo *Meiji-Mura* 博物館明治村

[ĝenerala informo]

Meiji-Mura estas subĉiela arkitektura muzeo kaj samtempe amuzejo en la urbo Inuyama. La muzeo konservas historiajn konstruaĵojn de la epokoj de *Meiji* (1867-1912), *Taisho* (1912-1926), kaj frutempa *Showa* (1926-1947). Pli ol 60 historiaj konstruaĵoj estis transportitaj aŭ rekonstruitaj sur 1 km² apud la lago Iruka. Unu el la plej rimarkindaj konstruaĵoj tie estas la rekonstruita ĉefenirejo kaj vestiblo de la hotelo *Teikoku* (Imperia Hotelo).

La epoko de *Meiji* estis periodo de rapida ŝanĝo aŭ “moderniĝo” en Japanio. Post jarcentoj da izoliteco, Japanio komencis asimili ideojn, sistemojn, leĝojn, sciencojn, teknikojn k.t.p. de la okcidento, inkluzive de konstrustiloj kaj konstruteknikoj.



[historio]

Taniguchi Yoshiro, arkitekto, kaj Tsuchikawa Motoo, posta prezidanto de la fervoja kompanio *Meitetsu* estis la fondintoj.

Taniguchi, vidinte subitan ŝanĝiĝon kaj perdiĝon de la malnovaj konstruaĵoj de *Meiji*, sentis la necesecon konservi ilin. Li petis sian universitatan samklasanon Tsuchikawa kunlabori por konservi okcident-stilajn konstruaĵojn havantaj kulturan kaj historian gravecon.

En 1962 por tiu celo ili fondis la fondaĵon, al kiu *Meitetsu* disponigis la financadon. *Meiji-Mura* estis malfermita la 18-an de marto 1965.

En la komenco ĝi havis nur 15 konstruaĵojn sur la areo de 0.5 km². Iom post iom tieaj konstruaĵoj multiĝis - nun 67. Inter ili 14 konstruaĵoj estas registritaj kiel Gravaj Kulturaj Proprietaĵoj, kaj preskaŭ ĉiuj ceteraj kiel Fizikaj Kulturaj Proprietaĵoj.

Oni povas promenadi en tiu ĉi subĉiela muzeo ĝuante atmosferon de la epoko *Meiji*, lerni historion kaj eĉ manĝi kaj trinki frandaĵon tiuepokan.

[ĉefaj konstruaĵoj]

❖ Ĉefenirejo kaj vestiblo de la hotelo *Teikoku* [*Imperial Hotel*, 帝国ホテル]

La hotelo estis unu el la ĉefaj verkoj de Frank Lloyd Wright. Estis konstruita en 1923, la jaro, en kiu granda katastrofo de la tertremego atakis Kantoan regionon. Pro kadukiĝo ĝi estis malfondita en 1967, kaj ekde 1976 dum pli ol 10 jaroj daŭris ĝia transportado. La plej granda konstruaĵo en la muzeo.



❖ Reziĉejo de Saigo Tsugumichi [西郷従道邸]

Verko de la franca arkitekto Jules Lescasse. Saigo Tsugumichi (1843-1902) estas politikisto kaj generalo, kaj frato de fame konata Saigo Takamori. Oni ekspozicias ĉi tie meblojn uzatajn en la bankeda domo *Rokumeikan* kaj la ŝtata gastejo de Akasaka.



❖ Preĝejo de sankta Johano [聖ヨハネ教会]

Verko de la usona arkitekto kaj misiisto James Gardiner. Origine estis preĝejo de Japana Anglikana Eklezio, en Kioto. Duetaĝa konstruaĵo el ligno kaj briko, kun tegmento el kupro. Gotika stilo.



❖ Lumturo de Shinagawa [品川灯台]

La plej malnova lumturo okcident-stila, desegnita de la franca inĝeniero Léonce Verny. Altas 9 metrojn.

❖ Teatro *Kureha-za* [呉羽座]

Konstruita en la urbo Ikeda (la gubernio Osako) en 1892. Duetaĝa ligna konstruaĵo. Ĝi estis ejo ne nur por moderna aŭ tradicia teatraĵo - kabuko - sed

ankaŭ por politika parolado. Efektive Ozaki Yukio kaj Kotoku Shusui paroladis ĉi tie.

❖ Poŝtoficejo de Uziyamada
[宇治山田郵便局]

Unuetaĝa ligna konstruaĵo kun kupra tegmento. La ekstera stilo estas duon-trabfakaĵa. Konstruita en 1909 kaj efektive funkcia ankoraŭ nun.

❖ Bovaĵa Restoracio Ooi [大井牛肉店]

Antaŭ la epoko *Meiji*, japanoj ne manĝis viandon; interalie bovaĵo kaj porkaĵo estis tabuoj. En la urbo Kobe, kie loĝis multaj eksterlandanoj, tiu ĉi restoracio estis malfermita en 1887. Ĉi tie oni povas gustumi bovaĵon kun tiutempa kuirarto, t.e. *gyunabe* (boiligita bovaĵo en potu).

❖ Instituto de Kitazato [北里研究所]

Kitazato Shibasaburo (1853-1931) estis kuracisto, bakteriologo kaj medicina edukisto. En 1980 la ĉefdomo de lia instituto estis transportita. Duetaĝa ligna konstruaĵo.

❖ Vaporlokomotivo

Oni povas sperti kvinminutan vojaĝeton inter du stacioj per trajno kun vaporlokomotivo efektive uzata en *Meiji*.

[utilaj informoj]

bileto: 2000 enoj por plenaĝulo, 1600 enoj por maljunuloj,
700-1200 enoj por studentoj

horo: principe de 09h30 ĝis 17h00

alio: de la stacio Inuyama de Meitetsu buse 20 minutojn
aŭ de la stacio Nagaya (Nagojo) buse 1 horon

kaj 20 minutojn

URL: <https://www.meijimura.com>



(Yamaguti Sin'iti)

🎵 🎵 Sinprezento de nova membro 🎵 🎵

はじめまして、名古屋エスペラント協会に参加することになった相原輝と申します。よろしくお願ひします。

エスペラントに参加するきっかけになったのは、Duolingoのコースと、10代のころから行っていた国際交流です。

また自分はブルードンやチョムスキーなどに近い考えを持っており、グローバリズムの反動で世界的に広まっている民族対立、排他主義やナショナリズムの風潮に強い警戒感を持っていました。

その中でエスペラントが国際主義、平等、多様性を重視する言語と知り、自分の考えや生活スタイルと合致していると思って学習を始めました。

現在は、エスペラントの他、古典語を中心に携帯のアプリなどでインドヨーロッパ系の言語をいくつか勉強しています。また、オンライン上に辞書も作っていません。<<https://aryandictionary.com/>>

今後の活動

❖ ワールドコラボフェスタ2023

10-14(土)、10-15(日)の両日、オアシス21(栄)にて開催。名古屋エスペラントセンターは両日ともに出展します。ぜひ足をお運びください。

❖ 日本エスペラント大会分科会

「PVZについて一発刊50周年に寄せて」として、今井田健二が講演を行います。(分科会は現地ですが、講演者はオンラインで自宅から話します。)

❖ オンライン作文講座

- ・ 期日：隔週月曜日の20時から21時、いつからでも参加できます。
- ・ 方法：Zoomを用いたオンライン
- ・ 費用：NEC会員は無料、非会員は1回200円(希望回数分だけNECの講座へ事前に振込んでください。00840-8-40765「名古屋エスペラントセンター」)
- ・ 講師：山口眞一
- ・ 方法：予め送られた課題文をE訳したものを、講習日の3日前までに講師へ提出していただき、当日は、提出された訳文を検討添削していきます。
- ・ レベル：初中級。KER試験のB1程度。ただし実際には受講生のレベルにあわせることとなります。
- ・ 申込：山口へ直接メールで <syam-z@wa2.so-net.ne.jp>

活動日誌（5月から7月）

- 5/18（木）19時から20時半 センター委員会（オンライン）
5/19（金）17時半から19時半 中級学習会
5/30（火）15時から18時 自由会話と読書会（オンライン）
6/2（金）17時半から19時半 中級学習会
6/11（日）17時から18時 Ho Song氏講演会
6/16（金）17時半から19時半 中級学習会
6/22（木）19時から20時半 センター委員会（オンライン）
6/27（火）15時から18時 自由会話と読書会（オンライン）
7/7（金）17時半から19時半 中級学習会
7/17（月）9時半から10時50分
愛知サマーセミナー・講座「国際語エスペラント」（名古屋大谷高校）
（次号にて詳細報告）
7/17（月）13時から14時 センター通信発送作業（瑞穂生涯学習センター）
7/17（月）14時から15時半 センター委員会（瑞穂生涯学習センター）
7/21（金）17時半から19時半 中級学習会
7/24（月）20時から21時 オンライン作文教室

▶編集後記

○世界的にコロナ禍が落ち着きを見せはじめ、海外往来も平常に近づきつつあります。そんな中で、韓国のベテランエスペランチストのHo Songさんがセンターにおいでになったことは喜ばしいことでした。（惜しむらくは講演への参加者が少なかったこと）○しかしながら、世界エスペラント大会への参加者はまだ低調で、特に日本からは36人だけ（全世界では1201人）。センターからは伊藤俊彦・順子夫妻、水谷良典、そして私の4人が参加します。次号でその様子を報告できると思います。○猛暑が続いています。「センター通信」発送作業をするのに、エアコンのない事務所ではとても耐えられない、ということで外部施設を使うことになりました。皆様も体調にお気をつけください。（山口）

<h3>センターの会員（維持員）募集中</h3>

A:月500円 / B:月1,000円 / C:月2,000円 / D:月3,000円

ランクによる会員資格に差はありません。ランク別及び振込月数を明記して郵便振込（口座番号は表紙タイトル下）へお願いします。メールアドレスがあれば、それもあわせてご記入ください。